

La Esperantisto.

Zeitschrift für die Freunde der Esperantosprache. Gazeto por la amikoj de la lingvo Esperanto.

Eldonata unu fojon en la monato de L. Zamenhof.

Kosto por $\frac{1}{2}$ jaro (kune kun poŝta transsendo) 2 markoj 30 pfenigoj. (Por Rusujo — 1 rublo, por ĉiuj ceteraj landoj — 3 frankoj.) Anstataŭ mono oni povas sendi signojn de poŝto (de ĉia lando), sed en tia okazo oni devas sendi per 20% pli multe ol la kosto nominala. Anoncoj po 1 marko por $\frac{1}{32}$ de la paĝo.

Ĉio tuŝanta la gazeton „La Esperantisto“ (kiel ekzemple leteroj, artikoloj, pago por la abonado k. c.) devas esti sendata al L. Zamenhof. (Adreso: Dr. L. Zamenhof à Varsovie, Russie).

Oni povas aboni ankaŭ en la librejo de Heerdegen-Barbeck en Nurnbergo.

Nr. 11.

Nurnbergo, Novembro 1890.

Jaro 1.

De la redakcio.

Kelkaj malfacilaĵoj, ne eviteblaj ĉe la transiro de gazeto el unuj manoj al aliaj kaj de malnova ordo al nova, kaŭzis unu malagrablan eraron en la No. 10 de nia gazeto. Pro kaŭzoj tute ne dependantaj de ni la numero eliris tre malfrue kaj en ĝia titolo mankis la vortoj „numero Julia“ kaj danke tiun ĉi mankon nia enkonduka artikolo fariĝis nekomprenbla kaj stranga. Nun ni jam faris ĉion por ke tiaj eraroj ne ripetigu. Sed por rompi unu fojon kun la malnova ordo kaj kun la konfuzoj ligitaj kun ĝi, ni decidis fari la jenon: ĝis Januaro ni eldonos nur la numerojn 11 kaj 12, tiel ke la dua jaro de l' eldonato (de No. 13) komenciĝos de Januaro kaj la abonado nun povos esti kalkulata de Januaro ĝis Januaro. Jam de la No. 13 la numeroj elirados regule en la komenco de ĉiu monato kaj en grandeco duobligita.

Tiel tri monatoj perdiĝis kaj ne estas jam tempo real-peli ilin. Sed la abonantoj de tio ĉi nenion perdos, ĉar ĉiu ricevos tiom da numeroj, por kiom li pagis, nur anstataŭ Julia, Augusta kaj Septembra li ricevos la numerojn kun datoj de Oktobro, Novembro kaj Decembro. La abonantoj de tio ĉi nur gajnos, ĉar anstataŭ atendi ĝis la No. 16, nia gazeto akceptos sian novan plibonigitan formon jam de la No. 13.

Pri la Ligo.

Kune kun la No. 5 de la „Esperantisto“ la abonantoj de tiu ĉi gazeto ricevis cirkuleron de la klubo Esperanta en Nurnbergo kun la sciigo, ke estas fondita Ligo internacia de Esperantistoj kaj estas elektitaj prezidanto, sekretario kaj kasisto, pri kies akceptado kaj sankciado oni petas la legantojn. La legantoj ekmiris, kaj baldaŭ komencis venadi demandoj kaj protestoj. La No. 6 de la „Esperantisto“ ŝajne alportis klarigon de tiu ĉi enigmo, donante en mia nomo Regularon de la Ligo, antaŭparolon al tiu ĉi Regularo kaj klarigan leteron pri la cirkulero Nurnberga. Tamen efektive la afero ĝis nun ankoraŭ tute ne estas klarigita. Kelkaj cirkonstancoj, ne dependantaj de ni, donis al la tuta afero alian karakteron ol ĝi devis havi, kaj ne pli frue ol hodiaŭ ni havas la okazon paroli pri la Ligo pli vaste.

Sciante, kiel grava en ĉia afero estas laborado kunigita, mi proponis en la No. 3 de la „Esperantisto“ fondi Ligon internacian de niaj amikoj. Kelkan tempon post la preso de mia propono mi trovis min persone en tia nedefinita situacio, ke mi ne sciis, kie kaj kiam mi devos loĝi kaj ĉu mi povos en la daŭro de kelka tempo aktive preni parton en nia afero.

Tial, timante ke nia afero ne rompiĝu en la mezo, mi decidis rapidigi la kreigon de la Ligo kaj, ne perdante tempon, mi sendis al la redakcio de la „Esperantisto“ mian propran Regularon kune kun antaŭparolo, en kiu mi klarigis la kaŭzojn de mia rapidado. Ricevinte mian Regularon, la redakcio de la „Esperantisto“ dissendis sian nemotivitan cirkuleron pri la fondiĝo de la Ligo kaj pri la Provizora Komitato. La No. 6 alportis mian Regularon, sed tiu ĉi Regularo, subskribita de mia nomo, estis por mi mem ne malgranda surprizo, ĉar mi trovis en ĝi kelkajn ŝanĝojn, kiuj donis al la afero tute alian fizionomion.

Tiuj ĉi malfeliĉaj ŝanĝoj estis pura blinda okazo. Por ke la legantoj ne pensu, ke la redakcio ilin faris en ia malbona intenco, mi diros antaŭ ĉio kelkajn vortojn pri la kaŭzoj de tiuj ĉi ŝanĝoj. Kelkaj punktoj en mia Regularo ŝajnis al la redakcio ne bonaj kaj elvokis la timon, ke la Regularo estos ne bone akceptita aŭ tute ne efektivebla. En ĉia alia tempo la redakcio kredeble skribus al mi sian opinion, mi responde klarigus al ĝi la signifon kaj la celon de la demandaj punktoj kaj ĉio fariĝus bone. Sed en la tiamaj cirkonstancoj la konsilio devus okupi tro multe da tempo, kaj la tempo ŝajnis tre kara. Tial, por ne perdi tempon, la redakcio faris mem kelkajn ŝanĝojn en la punktoj, kiuj ŝajnis al ĝi ne bonaj; la redakcio povis ĝin fari kun tiom pli granda rajto, ke la ŝanĝoj je l' unua rigardo efektive ŝajnis tre malgravaj kaj sensignifaj kaj povantaj havi nenian influon sur la komunan karakteron de la Regularo. Sed bedaŭrinde tiuj ĉi ŝanĝoj, je l' unua rigardo tiel malgravaj, donis rezultaton tute neatenditan.

Mi ne analizos la tutan signifon de la faritaj ŝanĝoj, mi diros nur kelkajn vortojn pri ilia komuna karaktero. Verkante mian Regularon (kiun mi longe pripensadis), mi havis antaŭ la okuloj la specialan situacion, en kiu sin trovas la plej granda parto de niaj amikoj, kaj la sperton, kiun donis al mi mia trijara laborado en nia afero. Ne estante kaj nepovante ankoraŭ esti societo oficiala, havante fiajn membrojn en diversaj landoj sub diversaj leĝoj kaj kondiĉoj, nia Ligo ne povis esti konstruita sur tiuj samaj principoj, kiel aliaj societoj. La ĉefaj principoj, sur kiuj mi fondis mian Regularon estis:

1) Nia lingvo, kiel ĉia alia lingvo, la plej bone devus esti tute libera kaj sendependa de ĉia leĝdonanta institucio kaj disvolviĝadi laŭ vojo natura; sed se ni jam transdonas la sorton de nia afero al ia institucio, ni povas ĝin fari nur tiam, kiam ni vidas, ke tiu ĉi institucio estas jam sufiĉe forta, ordigita kaj elprovita; ĉar alie ni riskas facilanime kaj malsaĝe detruiri en unu tago la verkon, kiu kostis jam tiom multe

la malfacila laboro kaj oferoj. Nia Ligo en tiu ĉi rilato tute povas esti komparata kun aliaj societoj (kaj sur tiun ĉi punkton mi ripetete turnas la atenton de kelkaj amikoj): ĉia societo havas la celon krei ion, kio ankoraŭ ne ekzistas; al la entreprenita afero ĝi donas, kion ĝi povas, kaj akceptas de ĝi nenion; tial ĝi povas komenci sian funkciadon eĉ ĉe la plej malgranda nombro da membroj, kaj ĉio, kion ĝi faris, estos nur pura gajno. Sed nia Ligo devas transpreni aferon jam kreitan kaj jam sufiĉe fortan, kaj la sorton de tiu ĉi afero ni jam ne povas blinde transdoni al ia malgranda malforta grupeto da homoj ne preparitaj kaj ne elprovitaj. Ĉar tiam per la transiro anstataŭ ion gajni nia afero nur perdus ĉion, kion ĝi havis ĝis nun: forton neniu el la malgranda grupeto povos al ĝi doni, sed rompadon, malordon kaj malkonsenton ĉiu alportos aparte, kaj post kelkaj semajnoj nia floranta kaj pace progresanta afero fariĝus publika ridindaĵo. Tial laŭ mia Regularo la sorto de nia afero devus transiri en la manojn de la Ligo ne pli frue ol kiam tiu ĉi lasta atingos la forton de almenaŭ 7500 frankoj ĉiujare (25 kluboj po 25 frankoj ĉiumonate); ĉar a) kiam la Ligo atingos tian forton, tio ĉi montros, ke ĝi kreskas regule kaj sendispute kaj la ordo en ĝi estas sufiĉe elprovita; b) la malgrandaj maloportunecoj aŭ disputoj, kiuj tiam eble ankoraŭ restos, estos kovritaj per la grava forto materiala, kiun la Ligo alportos al la afero. Ĝis tiu tempo laŭ mia Regularo la sorto kaj la bona homo de nia afero devus dependi de nenia institucio kaj nia Ligo devus esti libera kunigo de apartaj sendependaj kluboj.

2) La plej grava rajto de la membroj kaj kluboj — elekto de la estonta leĝdonanta kaj administranta akademio — devas esti en la manoj de la personoj, kiuj efektive subtenas nian aferon, kaj ne en la manoj de personoj, kiuj sub influo de unu minuto permesis enskribi ilian nomon, pagis kelkajn pfenigojn kaj poste forgesas pri la afero. Tial mi en mia Regularo mezuris la grandecon de la voĉoj ne laŭ la nombro de la enskribitaj membroj aŭ de la promesitaj pagoj, sed laŭ la grandeco de la efektive enportitaj oferoj („ĉiu klubo havas tiom da voĉoj, kiom fojojn 25 frankojn ĝi alportis al la kaso de l' Ligo, kalkulante la sumon de la komenco ĝis la tago de la voĉdonado“). Tio ĉi estas ne sole la plej justa, sed ankaŭ la plej facila maniero de mezurado; ĉar la ĉiumonataj enportoj estos ĉiam presataj, ĉiu povos ĉiam sendispute difini la grandecon de la voĉoj de ĉiu klubo, dum alie kontrolo estos tute ne ebla kaj eternaj disputoj kaj malordoj estos neeviteblaj. (Ne sole flanko persono ne povos kontroli la nombron de la membroj en ĉiu klubo, sed ĉiu aparta klubo mem neniam povos scii, kiom da membroj efektivaj kaj kiom da fikтивaj ĝi havas).

3) Estus ne prudente difini ian egalan pagon por ĉiuj membroj; ĉar difinante tro grandan pagon, ni perdos multajn membrojn kaj difinante tro malgrandan — ni perdos multan monon de la flanko de la pli riĉaj membroj, kiuj facile povus pagi pli multe. Sed en tia okazo pli granda pago devas esti ankaŭ ligita kun pli grandaj rajtoj. Tio ĉi ankaŭ povas esti atingita nur tiam, se ni mezurados la nombron de la primitivaj voĉoj ne laŭ la nombro de la enskribitaj membroj, sed laŭ la grandeco de la pagoj. (Unu amiko skribis al mi, ke ne konvenas kalkuli la grandecon de la voĉoj laŭ la enportita mono; sed alian pli bonan manieron de mezurado ni ja ne havas, ĉar mezuri la moralajn meritojn de ĉiu aparta membro estas ja tute neeble. Cetere la funkciistojn (kiel ekzemple Akademianojn, prezidantojn de kluboj k. c.) ni devas elekti laŭ iliaj personaj meritoj, sed la simplaj membroj de la Ligo estas ja nur simplaj matematikaj grandoj, por kiuj ni devas havi ian difinitan mezuron, kaj anstataŭ mezuri simple laŭ la kapoj (t. e. laŭ la enskribigoj, tute sensignifaj, kiel montris al. ni la sperto kun la „Promesoj“), estus jam per si mem

multe pli juste kaj pli prudente mezuri laŭ la fortoj, kiujn ĉiu kapo alportas, eĉ se la aliaj kondiĉoj ne postulus tian mezuradon.)

4) La grandeco de la voĉoj devas dependi de la grandeco kaj ne de la formo de la enportitaj oferoj; ĉar ne parolante jam pri tio, ke la esenco estas ĉiam pli grava ol la formo, la formo ofte dependas ne de nia volo, sed de aliaj cirkonstancoj (la leĝoj de l' lando, la tempo k. c.). Tial mi diris en mia Regularo, ke la interna organizacio de ĉia aparta klubo dependas tute de la volo kaj decidoj de tiu ĉi klubo mem, kaj por la Ligo estas gravaj nur la rezultatoj. „Ĉiuj enportitaj 25 frankoj havas unu voĉon (mi ripetos, ke tio ĉi estas nur voĉo elektanta, sed ne administranta), tute egale ĉu ili venas kune de cent personoj aŭ de unu persono; ĉu ili venas sub la nomo „pago de klubanoj“ aŭ ofero de unu persono k. c.“ Sendi monon estas permesite en ĉiu lando, sed esti „klubano“ estas en kelkaj landoj severe malpermesite. Tial se ni volus doni voĉon nur al tiu, kiu estas oficiale enskribita kiel „klubano“, ni eble morgaŭ vidos, ke ia sensignifa nenion faranta persono en ia malgranda germana urbeto post unuhora laborado havos 5 fojojn pli multe da voĉoj ol la tuta Rusujo, kiu havas 1/10 de ĉiuj niaj amikoj; ĉar laŭ la nun ŝanĝita Regularo li kolektos nur 100 personojn (eble 100 malgrandajn infanojn), kiuj nenion farante kaj nenion pagante — devos nur konsenti, ke oni ilin enskribu kiel „klubanoj“, li pagos por ĉiuj 100 personoj kune unufoje 20 markojn — kaj en unu horo li ricevos 5 voĉojn en la Ligo, dum la tuta Rusujo kun ĝiaj multaj efektive laboremaj amikoj, kun ĝiaj konstantaj grandaj oferoj k. c. eble ne havos tuta kune eĉ unu voĉon, ĉar danke la leĝojn de l' lando eble en la tuta Rusujo ne troviĝos 20 personoj, kiuj volus esti enskribitaj kiel „klubanoj.“

Tio ĉi estas la plej gravaj principoj, sur kiuj mia Regularo estis fondita. Ĉiuj aliaj punktoj estas multe malpli gravaj, ĉar ili tuŝas nur aferojn estontajn, kiujn ĝis ilia uzado ni havas ankoraŭ la eblon kelkfoje priparoli kaj ŝanĝi. Bedaŭrinde la ŝanĝoj faritaj en mia Regularo tuŝis rekte la fundamenton kaj tiel ŝajne tre malgrandaj kaj malgravaj ŝanĝoj per unu bato detruis ĉiujn plej gravajn principojn de mia Regularo kaj donis en mia nomo ordon, kiu laŭ mia opinio baldaŭ kondukus nin ne al potenco, sed al ruino.

Tian Regularon por nia Ligo mi neniel povus aprobi. Tre povas esti, ke mia Regularo estas ankaŭ tute erara kaj ankaŭ kondukus nian aferon en danĝeron; sed en mia mi almenaŭ mem la erarojn ne vidas, dum en la Regularo ŝanĝita mi vidas ilin klare kaj ne povas kun pura konscienco lasi sub ĝi mian nomon. La klubo Nurnberga faris la ŝanĝojn sen ia aparta intenco kaj nenion havus kontraŭ tio, se mi nun reenkondukus mian Regularon neŝanĝitan. Restus nun al mi nur represi mian Regularon en tiu formo, kiun ĝi havis antaŭ la faritaj ŝanĝoj. Sed la sperto de la lasta tempo estas tro grava, por ke ni povu lasi ĝin senatente. Kio antaŭ nelonge ankoraŭ ŝajnis disputebla nur en detaloj kaj en la formo, nun ĉiam pli kaj pli montriĝas disputebla en la principo mem. La historio de la lastaj 5—6 monatoj ĉiam pli kaj pli elmovas la demandon: „ĉu entute la Ligo estas necesa por nia afero, ĉu ĝi ne alportos pli da malutilo ol da utilo?“

(Fino venos.)

Artikoletoj.

Sinjoro Fr. Vl. Lorenc konsilas, ke la presejoj, kiuj ne havas la signetojn superliterajn, uzu anstataŭ ili kaj anstataŭ „h“ — apostrofon returnitan post la litero; ekzemple „ac'eti“ anstataŭ „acēti“ aŭ „acheti“. De nia flanko ni devas nur

peti, ke se oni volos uzi tiun ĉi konsilon, oni ne forgesu klarigi en la komenco de la presata verko la signifon de tiu ĉi returnita apostrofo.

Unu el la plej gravaj malhelpoj en la vastigado de nia afero estas la cirkonstanco, ke oni preskaŭ nenie povas ricevi la lernolibrojn de nia lingvo. Tiun ĉi plendon ni ricevas de diversaj flankoj preskaŭ ĉiutage. La plendo estas tute prava, ĉar kiel ni povas esperi, ke la nombro de niaj amikoj rapide kresku, se ni ne sole ne sufiĉe batalas kontraŭ la indiferenteco kaj ekscitas la publikon, sed eĉ tiuj, kiuj volas konatiĝi kun nia afero, ne havas la eblon? „Leginte en la gazeto X pri la lingvo Esperanto, mi volis konatiĝi kun ĝi kaj iris al ĉiuj libristoj de nia urbo, sed nenie mi povis ricevi lernolibron aŭ eĉ sciigi, al kiu mi devas min turni por ricevi tian lernolibron. Nur per okazo mi sciigis pri Via adreso kaj turnas min al Vi.“ Tiajn leterojn ni ofte ricevas, kaj la leteroj ordinare estas akompanataj je la konsilo, ke la aŭtoroj de verkoj en Esperanto, precipe la aŭtoroj de lernolibroj, devas dissendi siajn verkojn al ĉiuj libristoj, por ke tiuj ĉi lastaj ne sole sciu pri la verkoj, sed havu ĉiam en sia magazeno kelkan nombron da ekzempleroj. Ĉar se iu venas al libristo kaj ne povas ricevi lernolibron, li ordinare perdas ĉiun deziron serĉi plu, kaj tiel nia afero restas plejparte nekonata. Ni scias tre bone, kiel grave ĝi estus por nia afero, se la lernolibroj de nia lingvo sin trovus en ĉiuj librejoj, por ke ĉiu, kiu ion aŭdis pri nia afero, povu tuj konatiĝi kun ĝi anstataŭ baldaŭ forgesi eĉ ĝian nomon. Sed por ke la lernolibroj de nia lingvo sin trovu ĉe la libristoj de diversaj urboj, estas necese, ke pri tio ĉi zorgu niaj amikoj loĝantaj en tiuj ĉi urboj. Por ĉiu aparta amiko zorgi pri la libristoj en lia urbo estas afero tre facila, dum por la aŭtoroj zorgi pri ĉiuj libristoj en ĉiuj urboj estas tute neeble; ĝi postulus tre grandan unufojan enmeton de mono: oni devus presi la lernolibrojn en grandega nombro da ekzempleroj, elspezi multan monon por la poŝta transsendo tien kaj returne (se la libroj ne estos venditaj). Tia maniero de laborado estas ebla nur por grandaj riĉaj komercistoj, sed ne por la aŭtoroj de niaj lernolibroj, kiuj ne havas eĉ la plej malgrandan eblon fari ian novan paŝon ĝis la perdoj de la malnova estos kovritaj, aŭ presi novan nombron da ekzempleroj antaŭ ol la nova estas vendita. Tamen la malfeliĉa cirkonstanco kun la libristoj estos tre facile forigebla, se ĉiu el niaj amikoj aparte volos zorgi pri la libristoj en lia urbo de loĝado. Por ĉiu aparta esperantisto ĝi estos afero tre facila, kaj tial ni turnas nin kun peto al niaj amikoj, ke ili zorgu ke la libristoj en ilia loko ĉiam havu en siaj magazenoj kelkan nombron da ekzempleroj de lernolibroj Esperantaj (en kiu ajn lingvo kaj de kiu ajn eldonitaj.) Urboj, en kiuj la libristoj respondas al la demandoj „ni ne havas, ni ne scias“, — estas tute fermitaj por nia afero; ĉar el cent personoj, kiuj volas konatiĝi kun nia afero, troviĝos apenaŭ unu, kiu por ricevi libron volos iri pli malproksime ol al la libristo. La manieron, kiel igi la libristojn havi ĉiam kelkajn librojn Esperantajn, ni lasas al la bontrovo de ĉiu aparta amiko. Sed oni ne devas sin kontentigi je unu fojo: de tempo al tempo oni devas ripeti la provon, ĉu la libristoj havas niajn verkojn (gravaj estas nur la lernolibroj), kaj se ili ilin ne havas — uzi denove rimedojn ke ili ilin havu. En la unuaj kelkaj jaroj ni devas konstante kaj pacience laboradi, memorigadi, ekscitadi, ne timante la ridon de skeptikuloj kaj ne perdante la energion, kiam ni vidas, ke diversaj malfortaj animoj, kiuj en la komenco estis tiel varmegaj, baldaŭ tute forgesas pri nia afero. Tia ĉiam estis la historio de ĉiu nova utila ideo. En la unuaj kelkaj jaroj ni devas konstante senlace labori; sed post kelkaj jaroj nia afero staros jam forte kaj laborados

por si jam mem, kaj tiam la skeptikuloj dankos al ni por nia nefortimigita laborado kaj la malfortaj animoj hontos pro sia manko de konstanteco.

Novajoj.

Por la celoj de nia afero L. Zamenhof ricevis de s-ro C. Hübert el Aleksandrovska 2 rublojn 50 kop. — Kune kun la antaŭe ricevita ĝi faras: 5 r. 50 kop. kaj 20 milrejsojn.

Ni rekomencas la interrompitan publikigadon de la dissendataj vortaretoj, kiun ni nun akurate daŭrigados. En la lastaj monatoj venigis: s-ro J. Puĉkovski el Kjahta 500 vortaretojn; s-ro Chr. Schmidt el Nurnbergo (per kelkaj fojoj kune) 500 v.; s-ro A. F. Runstedt el Vedum 200 v. — De nun ni ĉiam presados sur tiu ĉi loko la nomojn de ĉiuj personoj, kiuj venigas por disdonado aŭ dissendado ne malpli ol 100 malgrandajn vortaretojn aŭ ne malpli ol 10 lernolibrojn de nia lingvo (en kiu ajn lingvo kaj de kiu ajn eldonitaj).

Sinjoro A. F. Runstedt en Vedum eldonas en la lingvo sveda malgrandan gramatikon de nia lingvo kun ekzercoj.

Sinjoro Puĉkovski el Kjahta skribas al ni, ke li preparas pli vastan lernolibron de nia lingvo por Rusoj.

Post kelkaj tagoj eliros nova paralela eldono de nia lernolibro por Rusoj, kiu estos tre grava por la propagado de nia afero. Ĝi havos formon de malgranda poŝa libreto, kaj oni povos ĝin ĉiam tre oportune porti en kelkaj ekzempleroj en la poŝo por montri aŭ disdoni ĝin al diversaj novaj personoj ĉe l' okazo. La libreto enhavos: 1) malgrandan antaŭparolon paralele en la lingvoj rusa kaj Esperanta; 2) versajon en Esperanto kun rusa traduko; 3) plenan gramatikon; 4) tabelon de ĉiuj prefiksoj kaj sufiksoj kune kun ekzemploj por ĉiu el ili; 5) vortaron Esperanta-rusan (pli plenan ol en la unua eldono); 6) vortaron rusa-Esperantan; 7) nomaron de nia tuta literaturo kaj 8) blanketon por subskribi por la personoj, kiuj volas esti enprenitaj en la adresaron de la Esperantistoj. La venda kosto de tiu ĉi libreto estos tre malgranda (2 rubloj por 25 ekzempleroj jam kune kun la poŝta transsendo; unu ekzemplero 10 kop.). Se la verketo plaĉos al niaj amikoj kaj se la kostoj de la presado estos kovritaj, tiu ĉi verketo estos iom post iom eldonita ankaŭ en diversaj aliaj lingvoj.

Respondoj al la amikoj.

Al s-ro C. en Cape-Town (Suda Afriko). Per poŝta karto mi siatempe respondis al Vi je Via letero, sed post kelka tempo la poŝto redonis al mi la karton kun la surskribo, ke por Via lando poŝtaj kartoj ne estas akceptataj. Tiam mi sendis al Vi jam leteron kovritan kaj mi petas Vin sciigi min, ĉu Vi ĝin ricevis.

Al s-ro R. en Borispol. La projekto de sinjorino Olga I. ekscitis vivan intereson ĉe multaj legantoj; sed la intereso estis, por tiel diri, pasiva kaj ne aktiva. La legantoj demandas, kio estos kun la projekto, sed preskaŭ neniu el ili donis ian precizan propran opinion pri tiu ĉi projekto. Kelkaj simple diris, ke la projekto estas ne plenumbla, dum unu el niaj plej varmaj amikoj, kontraŭe, tuj komencis la efektivigadon de la projekto kaj sendis sian subskribon kaj la subskribon de aliaj personoj, kiujn li tuj varbis laŭ la plano de la projekto. Laŭ nia propra opinio la artikolo

de sinjorino Olga L. estas tre bona, ĉiuj pensoj en ĝi estas veraj kaj logikaj, — sed la projekto mem estas ne efektivebla pro jena kaŭzo: La tuta esenco de la projekto konsistas en tio, ke ĉiu „vastiganto“ devas promesi, ke li trovos du novajn vastigantojn. Sed neniu povas promesi, ke li ion trovos, ĉar la trovado ne dependas de ni; ni povas nur promesi, ke ni serĉos, sed ne ke ni trovos. Kvankam per si mem la trovado de 2 novaj vastigantoj estus eble afero ne tre malfacila, tamen konsiderante, ke li eble malgraŭ sia penado ne povos ilin trovi, — preskaŭ neniu volos doni tian promeson el la timo fariĝi en okazo de malsukceso publika rompinto de sia vorto. Sed se en la promeso nomita en la projekto ni metos la vorton „serĉi“ anstataŭ „trovi“ aŭ „alporti“, tiam la tuta projekto perdos sian signifon, ĉar la serĉadon neniu povas kontroli. Tio ĉi estas la malforta flanko de la projekto, kaj tial, ĝis estos trovita ia rimedo por korekti tiun ĉi malfortigon, ni ne povas ankoraŭ preni la aferon en nian manon kaj komenci la publikigadon de la „vastigantoj“. Estus tre bone, se iu el niaj amikoj trovas ian rimedon, ke ĉiu vastiganto, en okazo se li ne trovas 2 novajn vastigantojn, povu purigi sin antaŭ la publiko per ia alia laboro egale forta, egale produktiva kaj kreskiganta kaj egale por ĉiu plenumbla; aŭ almenaŭ ke ĉiu en okazo de malsukceso havu la eblon elmontri, ke li efektive diligente kaj fervore serĉis novajn vastigantojn, sed ne trovis. Kiam estos trovita tia rimedo por purigi la honoron de ĉiu diligenta sed nur malsukcesa „vastiganto“, tiam ni, sen timo fari fiaskon kaj kompromiti la malsukcesajn amikojn, komencos presadi la ĉenon de la vastigantoj, ĉar tiam nenia vera amiko timos aŭ rifuzos enskribiĝi en la nombron de la „vastigantoj“. Pli aŭ malpli frue ni revenos ankoraŭ al tiu ĉi demando. Ni estus tre dankaj al tiu, kiu proponus al ni ian bonan rimedon por korekti la malfortan flankon de la projekto de sinjorino Olga L.

Al s-ro T. en S. Peterburgo. Vi miras, ke en la Adresaro unuj nomoj kaj adresoj estas skribitaj per ortografio Esperanta kaj aliaj per la diversaj ortografioj naciaj; jen estas la kaŭzo de tiu ĉi strangajo: Ne volante arbitre ŝanĝi la nomojn de niaj amikoj, ni presis ĉiun nomon kaj adreson tiel, kiel ĝi estis alsendita al ni. La adresojn, kiujn ni ricevis skribitaj per literoj latinaj, ni lasis en la formo, en kiu ni ilin ricevis (plejparte en ortografio nacia); nur la adresojn skribitajn per aliaj literoj (ekzemple rusaj), kiujn ni jam sen tio devis transmeti en alfabeton latinan, ni transmetis jam laŭ nia

ortografio. La logiko kategorie ordonas, ke por ĉiuj nomoj estu enkondukita unu egala ortografio (la simpla ortografio Esperanta), ĉar alie, trovante en verko Esperanta ian nomon, oni neniam scios, kiel ĝin elparoli. Sendube tio ĉi poste estos enkondukita, kaj post kelkaj jaroj la skribado „Byron“ anstataŭ „Bajron“ aŭ „Göthe“ anstataŭ „Gete“ kredeble estos rigardata kiel eraro. Tamen doni jam nun kategorian, difinitan kaj ĉiamdevigan regulon por la skribado de nomoj ne estas ankoraŭ lasi al ĉiu skribi la nomojn, kiel li trovas la plej oportune, aŭ laŭ la ortografio Esperanta, aŭ laŭ la ortografio de la nacio, al kiu la nomo apartenas. La fina formo por la skribado de nomoj estos sendube la ortografio fonetika, kaj al tio ĉi ni devas ĉiam celi kaj alkutimi; sed nun ni ofte devas ankoraŭ uzadi la ortografion nacian, ĉar nia ortografio estas ankoraŭ tro malmulte konata en la mondo kaj, donante en tiu ĉi ortografio nian adreson, ni riskas, ke leteroj adresitaj al ni eble ne venos al niaj manoj. Al tiu ĉi demando ni ankoraŭ revenos en aparta pli detala artikolo; sed ĝis la demando estos difinite decidita per la uzado, ĉia maniero de skribado de nomoj estas bona, se ĝi nur estos komprenebla por la leganto.

Al s-ro G. en Odeso. Vi miras, ke por la Ligo de Esperantistoj estas verkita tia stranga kanto, kiu kun la celo kaj la esenco de la Ligo havas preskaŭ nenion komunan. Tute prave Vi skribas: „kial ni devas forĵeti ĉion teran? festi senzorge kaj sendolore? Serĉi lunon per vereco kaj virton per justeco estas tre bele, sed diri, ke tio ĉi devas esti la celo de nia Ligo, ni povas tiel same malmulte, kiel ekzemple diri, ke nia celo estas respekti maljunulojn, kio ja ankaŭ estas tre bela afero!“ Jes, sinjoro, Vi estas tute prava; sed Vi devas scii, ke la „Kanto de l' Ligo“ presita en la No. 7 tute ne estas la kanto de l' „Ligo de Esperantistoj“, kvankam la nomo de la kanto, ĝia presado tuj post la Regularo kaj la muzikaj notoj al tiu ĉi kanto aldonitaj al la No. 8 devis supozigi, ke la kanto estas verkita speciale por la Ligo de Esperantistoj. Ankoraŭ antaŭ 6—8 monatoj laŭ la peto de la redakcio mi tradukis por la „Esperantisto“ diversajn kantojn, kaj inter ili ankaŭ la germanan kanton „Bundeslied“. La kantoj kuŝis kelkan tempon ne uzataj, kaj ĝi estas nur pura okazo, ke unu el ili, portanta okaze la nomon „Kanto de l' Ligo“, estis presita en la gazeto ĝuste post la fondo de la Ligo de Esperantistoj. Speciale kun la Ligo Esperanta tiu ĉi kanto havas nenion komunan.

Anoncoj.

G. Zechmeyer en Nürnberg.

Plej granda komerco de signoj de poŝto.

Ĉiuj kasitaj signoj de poŝto estas aĉetataj kaj ŝanĝataj.

Alle gebrauchten Briefmarken werden gekauft und umgetauscht.

Senpage instruas la lingvon Esperantan
Vladimir Vladimiroviĉ de Majnov en S. Peterburgo.

Mielkukoj Nurnbergaj, plej bona speco asortita, estas forsendataj en poŝtaj paketoj je kosto de markoj 3, 5, 10 — al aliaj landoj. Kun la komisioni sendu samtempe la sumon en signoj de poŝto aŭ per poŝta mandato.

A. Kleinlein,

Strato de l' Reĝo, 53.

La presejo de W. Tümmel en Nürnberg,

de kiu tiu ĉi gazeto estas presata, rekomendas sin por ĉiuj presaj laboroj.

F. Lorenc en Zbilav, Čáslav, Boh., instruas senpage lingvojn slavajn.

Riĉard Geoghegan en Birkenhead, Anglujo,

instruas senpage la lingvon „Esperanto“ kaj per la lingvo „Esperanto“ ankaŭ la lingvojn anglan, hindan kaj ĥinan.